Anyone used to taking part in events at Wedgwood Memorial College will feel completely at home at Shallowford. There are comfortable rooms and delicious food, served by friendly staff in a beautiful country house. Outside are extensive gardens which include a croquet lawn. Just down the road is the home of Izaak Walton the angler. Further afield are the rolling countryside and windswept moorland of Staffordshire, an area of England as individual as Bavaria or the Auvergne.

Small classes

Our programme allows anyone who already knows some Esperanto to take part. There is an intermediate and an advanced course, for a full week from Monday to Friday. Classes are small and one-to-one help readily available. During recent years the intermediate group has covered topics such as the merits of sisters as siblings, the lifestyle of the three-toed sloth and how to cook green spaghetti. In the advanced group you will have

the opportunity to learn more about the history and development of Esperanto and read original literature in the language.

You may prefer to plan your own holiday at Shallowford. You also have the option of attending evening events, which include lectures and an entertainment evening all in Esperanto, of course. The house has its own

bar, an excellent place to practise the language learnt during the day.

The Summer Festival runs from Monday 12 to Friday 16 August. Further information and booking forms are available from Esperanto House (see page 2 for contact details).

Jack Warren

Zsófia Kóródy, who lectured at last year's Summer Festival.

Photo: Paul Gubbins



Simpozio **“Lingvoj kaj internaciigo** **en supera edukado:** **Ideologioj, praktikoj,** **alternativoj”** *Rejkjaviko, 18–20 julio*

La Centro de Esploro kaj Dokumentado pri Mondaj Lingvaj Problemoj (Roterdamo, Nederlando), kiu aŭspicias la revuon *Language Problems and Language Planning*, organizas de tempo al tempo por invititaj gastoj internaciajn simpoziojn pri aspektoj de lingvouzado kaj lingvopolitiko. (Ili estas nomataj Nitobe-simpozioj laŭ la konata japana funkciulo asociita kun la Ligo de Nacioj en la 1920aj jaroj.) La plej lasta tia simpozio okazis en Tokio ĉe la Universitato Sophia pri la temo “Al justa lingvopolitiko en Azio”.

La Simpozio en Rejkjaviko konsistos el referaĵoj, prezentoj kaj podiaj diskutoj de fakuloj el la tuta mondo, kun aparta emfazo al la Nordiaj landoj kaj

al instrulingvoj en supera edukado. La temo estos ligita al la antaŭvidata aperigo de libro redaktita de Anna Kristina Hultgren, Frans Gregersen, kaj Jacob Thøgersen, *English in Nordic Universities: Ideology and Practice*, eldonota en la serio *Studies in World Language Problems*, probable en frua 2014, de la eldonejo John Benjamins, Amsterdamo.

La simpozio okazos sub aŭspicio de la Instituto Árni Magnússon por Islandaj Studoj, kun financa subteno de ESF kaj de la eldonejo John Benjamins.

Partopreno en la simpozio estas laŭ invito. Bonvolu kontakti Humphrey Tonkin ĉe tonkin@hartford.edu por ricevi pliajn informojn. □

Interlingvistiko kaj **esperantologio daŭre en** **la paletro de UAM**

Jam de 15 jaroj la fino de septembro kaj komenco de februaro estas dediĉitaj al la intensaj sesioj de la postdiplomaj Interlingvistikaj Studoj de la Universitato Adam Mickiewicz (UAM), en Poznano, Pollando. Ili havas firman lokon en la universitata paletro kaj proponas

universitatnivelan studadon kun fina atestilo al ambiciaj esperantistoj. Ili entreprenas ankaŭ la formadon de Esperanto-instruistoj. En la tria jaro de la studoj okazas instruista specialigo. Kunlabore kun ILEI kaj Edukado.net, tion kiel instruistan trejnadon ni proponas ankaŭ al

pli vasta publiko, kiu volas instruistan spertiĝon dum unu jaro. Similan kurson ni organizas kelkfoje gvide de Katalin Kovats. Ni atendas aliĝantojn por la septembra sesio (14–20). *Informoj:* en la retpaĝo Studoj, kaj per interlin@amu.edu.pl.

Stipendioj helpas

La kvina grupo de la Interlingvistikaj Studoj travivis sian kvaran sesion en februaro. Kvankam la nombro de studentoj iom malpliĝis, la persistuloj (4 el Brazilo, po 2 el Svislando kaj Pollando, po 1 el Germanio, Hungario kaj Rusio) aktive partoprenis la sesion. Stipendioj de ESF kaj ILEI-UEA daŭre helpas al kelkaj.

Pluraj prelegantoj

Aleksander Korĵenkov, ruslanda eldonisto kaj esploranto, lekcias pri la historio de la Esperantomovado: skizis la ĉefajn eventojn, konfliktojn kaj tendencojn en Esperantujo, kiuj fojfoje surprizis la studentojn.

La lingvistikajn kursojn gvidis Ilona Koutny, multe diskutante kun la gestudentoj. Ŝi prezentis la semantikan sistemon de Esperanto, kun ĉiaj fontoj kaj memstara evoluo, analizis la semantikajn rilatojn inter la elementoj de la vortoprovizo kaj la frazeologiaĵojn, tuŝis la problemon de lingvotavoloj kaj provis trovi la lokon de Esperanto inter la etnaj lingvoj perhelpe de lingvotipologio kadre de gramatika kurso. Ŝi esploris la specifaĵojn de la Esperanta lingvouzo en diversaj okazoj kaj ĝentilecformoj kadre de pragmatiko. Kurso pri aplikata lingvistiko enkondukis i.a. al lingvoplanado, tradukado, leksikografio, terminologio kaj komputa lingvistiko.

Al la programo kontribuis Zbigniew Galor, profesoro pri sociologio, per prelego pri socio kaj lingvo. Gastprelegis Christoph Goro Kimura,

• Ĉevalaĵo



Dear Sir,

I note with some amusement that in these days of the horse-burger scandals, the phrase *mi manĝigos mian ĉevalon*, which for Zamenhof was perfectly clear in its meaning – see *Lingvaj Respondoj* 13 – has now acquired a disturbing ambiguity.

Terry Watts,
Ramsgate



• Muzaiko podkastas 24-hore tage en Esperanto

Estimataj,

La retradia kanalo Muzaiko ludas 24 horojn tage muzikon, programerojn, novaĵojn, informojn, raportojn, arkivaĵojn kaj multe pli – kaj ĉion en Esperanto!

Pro la bunta elsendo Muzaiko celas kaj spertajn parolantojn kaj komencantojn – kaj por aŭskulti kaj por kunkrei.

Aŭskultu ĉe <http://muzaiko.info/> kaj por kontribui skribu al 'info' ĉe muzaiko.info.

Por pliaj informoj, bonvolu konsulti la paĝaron <http://muzaiko.info/pri-muzaiko/legu>.

Muzaiko volonte disvastigas informojn pri viaj agadoj en la Esperanta mondo aŭ respondas al viaj demandoj.

Veronika Poór
kaj la teamo de Muzaiko,
Bristol

• Itala kongreso en aŭgusto

Estimataj,

La 80a Itala Kongreso de Esperanto okazos en Castellaro, apud San-Remo, de la 3a ĝis la 10a de aŭgusto 2013. La etoso de itala kongreso plenplenas je seminarioj, prelegoj, kursoj kaj ekskursoj. Ĝi estos ankaŭ ferioj en belega loko apud la maro kaj montaro kun eblo resti en la kongresejo por la programo kaj bani sin en la naĝejo aŭ maro. La suno kaj la maro estas senpagaj ĉeestantoj en tiu periodo en tiu parto de Italio, la tiel nomata 'lazura marbordo' inter Ĝenovo kaj Francio. Vi devas nur kunporti vian naĝkostumon.

Humphrey Tonkin kaj Paul Gubbins kaj multaj aliaj prelegantoj kaj instruistoj venos ĝuste por vi.

Vi rajtas, kiel en ĉiuj kongresoj, leviĝi matene kaj sekvi la programon dum la tago. Sed vi rajtas ankaŭ dormi dum la tago kaj sekvi la programon dum la nokto. Nokte vi unuavice rajtas festi kun ni.

Gejunuloj, laŭ aĝo kaj koro, rajtos partopreni la vesperan programon: ni kune ludos, malkovros la trinkomanĝajn kulturojn internaciajn kaj lokajn, ni spertos la belecon de la lazura marbordo inter Italio kaj Francio dum la someraj noktoj... kaj kunumos por iom da sana diboĉado internacia je la nomo

profesoro pri lingvistiko el Tokio, pri la interlingva komunikado, pri la interna ideo kaj la ne-eŭropa aliro al Esperanto. Li revenos en aprilo por prelegi en la Lingvistika Instituto pri siaj esploroj – laŭ invito de la institutestro.

La bonetosan kaj riĉan kursaron kompletigis la komuna vespero en la fervojista domo,

kie la partoprenantoj prezentis poemojn, kaj Mirejo Grosjean parolis pri afrikaj etosoj. Post la kurso okazis ekskurso al Vroclavo, kie la lokaj esperantistoj gvidis tra la urbo.

Prof. Ilona Koutny
Prof. kaj gvidanto de la
Interlingvistikaj Studoj
<http://www.staff.amu.edu.pl/~interl/index.html>

de la Zamenhofa interna ideo.

Por la tuta programo, aliĝilo, loĝado ktp., bonvolu vidi en la retejo kongreso.esperanto.it.

Kontaktu tuj:

Laura Brazzabeni
laura.brazzabeni@alice.it



• Konga orfejo krizas en militzono

Saluton,

En la urbo Goma, Kongo-lando, ekzistas orfejo estrata de esperantistoj, kiuj okupiĝas pri la nutrado kaj lernejo de la infanoj, kaj krome instruas al ili Esperanton, kiel rimedon por komuniki kun la ekstera mondo.

Dum mia vojaĝo tra Ruando, mi renkontis unu el la respondeculoj, Alphonse Waseka, kiu rakontis al mi, ke pro la malapero de la du homoj kiuj financis kaj la militstato en kiu ili troviĝas, ili alfrontas grandajn problemojn por nutri kaj lerneji la infanojn. La solaj enspezofontoj estas kantino kaj kokejo, kiuj donas tre nesufiĉajn enspezojn. Por bone elturniĝi, ili bezonus pligrandigi la kantinton kaj la kokejon, kaj ili taksas la projekton je ĉirkaŭ 6 000 eŭroj. Mi proponis al Alphonse kolekti monon, kaj por tiu celo mi malfermis konton en Triodos Bank: ES12 1491 0001 222042949723.

Vi povas uzi ankaŭ mian konton en UEA: pahb-a, indikante "por la orfejo de Goma".

Iu ajn kvanto estos bonvena, kaj mi garantias, ke 100% de la mono atingos la orfejon (se eblas, mi mem enmanigos persone).

Mi ankaŭ petas disvastigi tiun peton kiel eble pli. Dankon!

Pedro Hernández
c/Candilejas 26, 1º izda
28018 Madrid, Hispanio
Tel: 912234853, 634410036
pedro@esperanto.es
<http://www.ipernity.com/home/pedroesperanto>

Renkontiĝo de JEB en Bristol

www.jeb.org.uk

Junularo Esperantista Brita (JEB) okazigis sian vintran renkontiĝon inter la 16a kaj 17a de februaro en la angla urbo Bristol. Ĝi estis la plej sukcesa evento lastatempe, ĉar dek unu homoj el ok landoj ĉeestis la aranĝon. La renkontiĝo oficiale komenciĝis kiel kutime en drinkejo de la ĉeno Wetherspoon sabate tagmeze. Ĉiuj partoprenantoj tie kolektiĝis por tagmanĝi, drinki, babili ktp. La du komitatoj de JEB, kiuj ĉeestis tiam, klarigis al ĉiuj pri la detala programo de la renkontiĝo. Ĉar estis ankoraŭ kelkaj partoj de la programo liberaj, oni demokratie elektis tie, kion fari. Permesi al la partoprenantoj kunkrei la renkontiĝon estis tre bona sperto, kiu tre helpis krei bonegan etoson inter ĉiuj. Verdire en tiu ĉi renkontiĝo la komitatoj ne multon bezonis decidi mem; ili simple laboris por ke ĉiuj povu kune decidi pri preskaŭ ĉio.

Tradicia ekskurseto

Post la manĝo oni faris la tradician ekskurseton tra la urbo, kiu estis gvidata de la lokano Mike. Ĉe suna kaj ne tre malvarma vetero oni promenis en la centro, apud la rivero, al parkoj dum pli-malpli tri horoj, kaj post plendoj de kelkaj homoj pri laceco oni elektis ĉarman drinkejon ene de ŝipo por sidiĝi kaj gustumi tre bonan lokan cidron. Tie oni restis longe antaŭ ol decidi reveni al la junulargastejo, en kiu gastis ok el la partoprenantoj, kaj la nokto daŭris tie kun tabloludoj, bilardo, bieroj kaj muziko. Tiel finiĝis la sabata tago de nia renkontiĝo.

Grave malfermi sin kaj kunkrei
Dimanĉon matene oni kolektiĝis en tre bela kafejo apud la rivero



La jena foto estis farita en kafejo en Bristol dum la matenmanĝo dimanĉon matene. Aperas de maldekstre: Magnus, Martin, Paul, Neil (nur parto de lia kapo), Mike, Rowland, Carlos Eduardo, Daria kaj Sasha.

por havi kune matenmanĝon. Post bona brita matenmanĝo oni okazigis kelkajn prelegetojn kaj debatojn. Unue Daria el Rusio prelegis pri Interlingvistikaj Studoj, kursaro en Esperanto, kiu okazas ĉiun trian jaron en la urbo Poznano en Pollando kaj en kiu John Wells estas unu el la instruistoj. Poste, Mike parolis pri la kreola lingvo de Haitio, lia patrujo. Kiel bonaj esperantistoj kiuj amegas ion ajn pri lingvoj, grandan debaton ni havis tie pri gramatiko, etnologio, fonetiko kaj aliaj aspektoj de la haitia kreola. Tiam venis momento paroli pri JEB mem. La komitatoj gvidis debaton pri eblaj pliboniĝoj por la organizaĵo. Oni ankaŭ provis allogi homojn partopreni en la Komitato por la sekva jaro, ĉar baldaŭ dum la Brita Kongreso, kiu okazos maje en la urbo Ramsgate, JEB havos sian jarkunsidon. Estas grave por

JEB nuntempe malfermi sin, por ke la membroj havu, se ili volas, la eblon kunkrei la organizaĵon kaj la junularan movadon en Britio.

Oni restis en la kafejo dum longa tempo, sed ĉar ankaŭ dimanĉo estis bela suna tago, oni decidis ankoraŭ promeni tra la urbo. Mike denove gvidis nin al kelkaj el siaj ŝatataj lokoj. Iomete post la tagmezo tri partoprenantoj revenis al siaj urboj, kaj la ok, kiuj restis, decidis viziti agrablan veganan kafejon. Tie oni manĝis, aŭskultis muzikon, ludis tabloludojn, babilis, kaj kiam estis jam vespere, oni devis oficiale fini la renkontiĝon, ĉar estis tempo preni la trajnojn hejmen por la plejmulto.

Verŝajne multnombre al la BK
Tiel finiĝis tre bona semajnfino inter esperantistoj en Bristol. Oni ankoraŭ ne findecidis kie kaj

Kiel ĝui la vivon post 70-jariĝo

Satiro laŭ Lukiano (ĉ. 117–180+ pK)

“Ha, do vi finfine alvenis ĉi tien, Polistrato. Nu, vi certe estas preskaŭ cent-jara!”

“Jes, naŭdekok-jara, se esti preciza, Similo.”

“Kaj kiel aferoj iradis por vi dum la pasintaj tridek jaroj? Ĉar ŝajnas laŭ mia memoro, ke vi estis jam sepdek-jara, kiam mi mortis.”

“Kvankam eventuale sonas strange, mi pasigis mirinde agrablan tempon.”

“Strange apenaŭ estas la ĝusta vorto, se vi kapablis amuziĝi je tiu aĝo, se oni konsiderus, ke via sano kredeble ne estis la plej bona, kaj vi havis neniun infanon por prizorgi vin.”

“Nu, la plej bona afero estis, ke mi povis fari, kion ajn mi deziris. Krome, mi havis multajn junajn belulinojn, kaj belulojn por servi al mi, multajn bonodorajojn, bonegan vinkelon, kaj mi posedis la plej bone kovritan manĝotablon en Sicilio.”

“Tio iom surprizas min. Miatempe vi estis ĉiam iom ŝparema.”

“Sed, karulo, ĉio tio envenis senpage, libere kaj kontraŭ nenio! Plej frumatene troviĝis aro da vizitantoj antaŭ mia pordo, portantaj ĉiajn grandiozajn donacojn el la tuta mondo.”

“Kial, ĉu vi fariĝis la sol-reganto aŭ simile post mia morto?”

“Ne, sed mi havis amasegon da admirantoj.”

kiam okazos la sekva JEB-renkontiĝo, ĉefe ĉar en majo la JEB-anoj verŝajne venos multnombre al la Brita Kongreso. Tie ni havos nian jarkunsidon kaj certe oni tie findecidos ĉion pri nia baldaŭa estonteco.

Carlos Castellani

“Ĉu admirantoj? Je via aĝo! Kun sole kvar dentoj propraj en la kapo? Ne igu min ridi!”

“Estas tute vere, mi certigas al vi, kaj ili ĉiuj estis elstare gravaj homoj. Kvankam maljuna mi estis, kiel vi vidas, tute kalva, kun akvumemaj okuloj kaj daŭre tia nazo, nenio plaĉis al ili pli ol ami min – kaj se mi eĉ ekrigardus unu el ili, tiu feliĉus dum la tuta tago.”

“Vi ne celas, ke vi estas alia Faono, ĉu? Vi ne pramis Afroditon trans Ĥion, kaj persvadis ŝin kompense fari vin denove juna kaj bela, ĉu?”

“Ne, mi aspektis tute same kiel nun – sed mi ne fariĝis iel ajn malpli alloga.”

“Vi parolas enigme.”

“Estas fakte tre simple. La homoj nuntempe enamiĝas kun maljunuloj riĉaj kaj seninfanaj.”

“Ha, nun mi komprenas la sekreton de via ĉarmo, vi maljuna fripono! Estis kazo de *ora* Afrodito, ĉu ne?”

Polistrato subridis: “Sed mi havis amason da amuziĝo el tiuj geamantoj miaj, Similo. Ili preskaŭ adoris min, vi sciu. Foje mi ludis koketulo kaj rifuzis akcepti ilin, sed ili daŭre konkuradis por miaj komplezoj.”

“Kaj al kiu vi fine postlasis vian monon?”

“Mi diradis al ĉiu tute rekte, ke al tiu sola mi testamentos la tutan monon. Ili kredis, ke mi verdiras, kaj flatadis min des pli. Sed tio, kion mi fakte diris en mia testamento, estis iom alia. Mi simple diris, ke ili ĉiuj iru al la infero.”

“Kaj kiu fine ricevis ĝin? Iu aŭ alia parenco?”

“Certe ne. Mi postlasis ĝin al belaspekta knabo el Frigio, kiun mi antaŭ nelonge aĉetis.”

“Kaj kiom da jaroj li havis, Polistrato?”

“Ho, ĉirkaŭ dudek.”

“Mi povas imagi la specon de afero, kiun li faradis por meriti

Daŭrigo sur la sekva paĝo

WANTED for Esperanto-related research

If anyone has any of the books or journals listed below that they no longer need, I would be very pleased to give them a loving home. They are needed for Esperanto-related research. Postage costs refunded. Angela Tellier, 10 Marina Gardens, Felixstowe, Suffolk IP11 2HW; e-mail: angela.tellier@esperanto.org.uk.

BOOKS

Primary French in the Balance. C. Burstall, M. Jamieson, S. Cohen, M. Hargreaves. NFER (Windsor) 1974.

French from Age Eight, or Eleven?: A study of the effectiveness of the teaching of French at the primary level in the schools of England and Wales. H.H. Stern, C. Burstall, B. Harley. Ontario Institute for Studies In Education 1975.

French from Eight: a national experiment. Clare Burstall. NFER (Slough) 1968.

JOURNALS

Language Problems and Language Planning. Edited by Humphrey Tonkin. Any issues before and including 2012.

Language Awareness (Journal of the Association for Language Awareness). Any issues before and including 2007.

Language Learning Journal (Journal of the Association for Language Learning). Any issues before and including 2007.

- **EAB sponsors Lernu.net**

EAB agreed some months ago to sponsor Lernu.net to the tune of €1,000 a year in recognition of the website's contribution to the teaching of Esperanto.

- **Danko el Kipro**

Roberto Pigro en Kipro dankas pro la materialo, kiun sendis al li senpage EAB por liaj ses ĝis dek junaj gelearnantoj, laŭdire tre lernemaj. En tiu lando antaŭe mankis parolantoj de Esperanto.

- **Clarence Bicknell**

Association formed

There has been so much interest in the life and works of Clarence Bicknell in France, Italy and the UK that it has been decided to create an association to commemorate and perpetuate his works, and plan to celebrate the centenary of his death in 2018.

He was born in London 1842, died in Casterino, Italy (now in France) in 1918, pastor, archaeologist, artist, man of letters, author, traveller, botanist, collector, humanist and Esperantist.

For further information on The Clarence Bicknell Association (L'Association Clarence Bicknell, Associazione Clarence Bicknell, Asocio Clarence Bicknell) see the new website

tion!", diris Similo kun okulumo.

"Nu, li meritis multe pli ol ili, eĉ se li estas eksterlandano kaj vera ĝenulo. Certe ĉiuj tiuj gravuloj jam amindumadas kun li! Nun, kiam li estas mia heredinto, ili certe jam faris lin aristokrato – kaj malgraŭ la fakto, ke li apenaŭ jam ekrazis sin, kaj la grekan elparolas abomene, homoj baldaŭ parolos kvazaŭ li havus pli da saĝo ol Odiseo!"

"Ho, nu, ne gravas. Kondiĉe, ke la aliaj ne akiras ĝin, estas indiferece al mi, ĉu li iĝus Reganto de Grekio." □

Fotis Arnold Pitt



Kamila kaj Arnold Pitt estis en Pollando de septembro ĝis novembro. Kamila staras apud memorŝtono, kiu legiĝas: "En la jaro 1902 loĝis en Szczwino Zdrój d[-]ro Ludoviko Zamenhof kreinto de la internacia lingvo Esperanto". Kamila kaj Arnold refoje vizitis Pollandon i.a. por partopreni en la Zamenhof-taga festo en Zielona Góra, kie estas multnombra grupo da esperantistoj.

clarencebicknell.com. The Association intends to operate this site in Esperanto, as well as English, French and Italian.

- **British Council tweets good wishes!**

The British Council mentioned Esperanto Book Day on Twitter and linked to the EAB website, wishing Esperanto well. This may be the first instance of such.

In fact, it ought not to come as a surprise, as the aim of the British Council is to promote British culture in whatever language, whether it be in English, Welsh, Gaelic, or indeed Esperanto. And with no Unesco Commission in the UK, they have a duty to promote culture in a wider sense.

The origin of the good wishes seems to be in Germany (Eilidh MacDonald, Project Co-ordinator Language Rich Europe,

British Council, Berlin ... "We value Diversity and the Environment").

A lesson for Esperanto publicity may lie in that Esperanto Book Day can be perceived as promoting 'culture', rather than just promoting 'Esperanto'.

- **49-aj Baltiaj Esperanto-Tagoj**

La Tagoj, organizataj de Litova Esperanto-Asocio, okazos en Utena inter la 6a kaj 14a de julio. Utena estas urbo de 35 000 loĝantoj, fondita en 1261. Aliĝo: Litova Esperanto-Asocio: p.k. 167, LT-44287 Kaunas. Poŝtel. +370-687-12219 kaj +370-686-69875; ret-adresoj: litova.ea@mail.lt, pjegorovas@takas.lt, irenaa@takas.lt.

- **Retejo de UEA novigata**

Laboroj pri uea.org progresas kaj eblas rekoni, ke la nova retejo de

Please note: Seminar on hold

Organisers of the three-day seminar due to be held towards the end of March at the University of Liverpool regret this was not able to go ahead. The university discovered the event clashed with an open day, which meant a lack of suitable rooms and possibly overnight accommodation for participants. It is hoped to offer the seminar, looking at aspects of Esperanto language, linguistics and literature, at a similar time next year.

UEA (<http://ttt.uea.org>) jam funkcias paralele al la malnova: <http://uea.org>.

Lastatempe oni aldonis al nepretaj partoj plusendilojn por la respondaj partoj de la malnova retejo. La laboroj daŭras, sed uzante la novan retejon oni mem povos konstati la antaŭeniron.

Samtempe, en la Komisiono pri Strategiaj Demandoj komenciĝis laboro pri diskutdokumento rilate al la retejoj de UEA.

• **La universala lingvo hebree en populara TV-programo**

Precize en la Zamenhof-tago, la unua kanalo de la israela televido elsendis hebrean version de la konata filmo de Sam Green *La universala lingvo*. Oni antaŭ-preparis ĝin por la jubilea jaro de Esperanto-Ligo en Israelo. Ĝi estis elsendita kadre de populara novaj- kaj kultur-programo. En la enkonduko, konata redaktoro kaj prezentisto salutis en Esperanto, informis pri la jubilea jaro, kaj fine ankaŭ menciis la Azian Kongreson okazonta en Jerusalemo en aprilo.

La raporto estas videbla interrete (<http://vimeo.com/55685895>).

• **UK has most listeners**

The new Esperanto-language radio station Muzaiko (www.muzaiko.info) has most listeners in the UK! It podcasts music, news and views 24 hours a day. To see the breakdown of listeners to Muzaiko by country, go to: <https://blu002.mail.live.com/default.aspx#n=636335133&fid=1&cid=13372f28-8ed6-cc8f-8ada-3ca91d71bd42&fv=1>.

• **Itala konkurso**

Denove Pistoja Esperanto-Grupo, Italio, organizas sian ĉiujaran konkurson. Ĝi temas pri rakontarto aŭ ĵurnalisma enketado kaj fotografio. La limdato estas la 22a de oktobro. Interesitoj bonvolu turni sin al s-ro

June seminar in York

Once again the Yorkshire Federation will be holding its annual Esperanto Seminar in York.

We have a tradition of inviting a distinguished Esperantist to provide a full-day programme of linguistically challenging tasks involving all participants. This year we are fortunate to have as our guest Ed Robertson, a figure already well known for his articles, lectures and other activities within and beyond his native Scotland.

The seminar will be on Saturday, 22 June. Tea, coffee and a buffet lunch will be provided. For further information and an application form please contact Jack Warren, 11 Linden Grove, Linthorpe, Middlesbrough TS5 5NF or p.warren47@hotmail.co.uk.

Printempa kunveno de NOEF

La printempa kunveno de la Nord-Okcidenta Esperanto-Federacio okazos en sia tradicia loko, Empire Services Club, Preston, la 27an de aprilo.

Greziljono invitas

• **20 aprilo–1 majo:** intensaj kursoj, KER-ekzamenoj, seminario pri interkultura komunikado.

Bonvolu vidi pliajn informojn en la retpaĝaro gresillon.org/printempo; retadreso: kastelo@gresillon.org

Nicola Morandi, Pistoja Esperanto-Grupo "Umberto Stoppoloni", Via dei Ciuti, 49/e, IT-51100 Capostrada. Poŝtel. +39 347 78.92.672; www.ipernity.com/home/77436; Skype: nikhmorand; www.esperanto-grupo.it. □

'Meet-up' in Birmingham

Meetup.com is a website for arranging get-togethers of individuals with the same interests. In Birmingham, groups already meet to chat in various languages. Until now there was no group for speakers of Esperanto. But no more!

Meetup.com/esperanto-birmingham invites you to enrol free in a new informal group. Supporters will see that a get-together to chat in Esperanto took place on 8 March. The web-site also asks whether or not you can attend the second meet-up.

John Gbourne

Wanted! Information wanted about the **John Buchanan Lectureship** and prizes.

• If you were a prize-winner or have details about any of the lecturers or courses held at the University of Liverpool, please contact Angela Tellier, 10 Marina Gardens, Felixstowe, Suffolk IP11 2HW; e-mail: angela.tellier@esperanto.org.uk. We are putting together a history of the lectureship and are missing key details.

Membership news

New members

Peeter Aitai, Bootle
Ricky Cormier, Luton
David Murray, Newtownabbey
James Purvis, Swindon
Maria Rosaria Spanò, Edinburgh
Mark Sterrick, Bathgate

New supporter

Alan Flynn, Peterborough

Deceased member

Eileen Oliver, Australia

CONGRATULATIONS Completed the Elementary...! Course

Paul Hankinson, Alsager



John Francis

La kolekto *Danco de vivo* de John Francis enhavas multajn neniam antaŭe publikigitajn poemojn.

Enhavo

Tipolo. Krizo. Al malfruantaj solenontoj. Se perfekte estus belo. Lageto. Aborto. Motivoj. Hebridea romano. Funebra festo. Indigno kontraŭ rezignacio. Spleno. La glavo kaj la fibulo. Ombroj en mateno. Eliro en dilemon. Vivosablo. Fera fanfaro. Rikolto sin resemos do. Himno al laboro. Ĝis revido. Influoj (1). Influoj (2). Danco de vivo. Balado.

Apendico


Ĝeraldina. Plankatene. La kosmo (reviziita). Ne, sed kaprice. Terapa retoro. A P R I L A. O M O R E S. Estado. Timo. Bremsu la jarojn. En amo denove esperartista. Frajlino. Renkonto.

| *Danco de vivo kaj aliaj poemoj*

| Motherwell: Scottish Esperanto Association, 2012.

| 79 paĝoj, 21cm, broŝurita. ISBN 978-0-9540252-3-6.

| Prezo ĉe la Libroservo de EAB: £6 + 20% por sendokostoj.



John C. Wells

English–Esperanto–English Dictionary (Angla–Esperanto–Angla Vortaro)

Ampleksa sed konciza ambaŭdirekta vortaro por komencantaj kaj progresintaj studentoj de Esperanto, kun enkonduka prezento de la gramatiko de Esperanto

Unue publikigita en 1969 de la eldonejo Hodder kiel *Teach Yourself Concise Esperanto and English Dictionary*, la nuna, dua eldono estas zorge reviziita kaj komplete reverkita. Ĝi plene spegulas la hodiaŭajn anglan lingvon kaj Esperanton.

Kun entute pli ol 30 000 kapvortoj, ĝi estas nemalhavebla riĉfondo por uzantoj de Esperanto, tenanta ĉiujn vortojn, kiujn oni bezonas, inkluzive de multaj fakvortoj.

Eldonas: Mondial (Novjorko), 2010 (Broŝurita versio: ISBN 978-1-59569-149-1; Malmole bindita versio kun kromkovrilo: ISBN 9781595691507). Ambaŭ: 508 paĝoj (xlvii + 462). Grando 5.5 x 8.5" (14 x 21,6 cm). Por pli da informoj vizitu la retpaĝaron: www.librejo.com/wells-vortaro.

- *Vendoprezoj ĉe EAB*: La broŝurita eldono kostas £16, la bindita £29, plus sendokostoj po 20%. Reta butikoj: www.fastcart.co.uk/cart/index.php?id=9449&item=Wells+Dictionary – aŭ telefonu al 0845 230 1887.